

Johann Wolfgang von Goethe,
Faŭsto, Unua parto, Nokto

tradukita de Boris Mirski

(Faŭsto sidas maltrankvile en sia fotelo ĉe la pulto, en malvasta gotika ĉambro kun alta arkaĵo.)

...

FAŬSTO:

Filozofio! Havu ĝin!

Scienco jura, medicin',

Ho ve, teologia tent',

En kiun pens' enstudis sin, -

Mi ĉion lernis kun atent'.

Nun, kompatinda malsaĝul',

Mi staras post ĉi vana streĉ'

Ol iam malpli saĝa eĉ. -

Magistr' nomiĝas mi, doktor'.

Kaj dum dek jaroj de fervor'

Maldekstren, dekstren, - laŭ okaz' -

Disĉiplojn tiris laŭ la naz',

Kaj fine venas al konkludo,

Ke vana estas ĉiu studo.

Bruligas koron tiuj rememoroj.

Jes, vere mi estas pli inda, laŭ moroj,

Ol ĉiuj skribistoj, magistroj, doktoroj;

Ne tranĉas min duboj, skrupuloj pri vero,

Timigas nek diablo, nek tuta infero.

Kaj tial neniam mi ĝojon atendas;

Neniam mi veron ekkoni pretendas,

Kaj eĉ en la penso ne volas prospekti,

La homojn bonigi aŭ ilin direkti.

Ĉe mi neniu don':

Nek bon', nek mon', nek iu kon'.

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

*Traduko de la Germana poemo "Faust, 1. Teil, Nacht" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de BORIS MIRSKI (Bela Manto, †1919).*

Arg-264-957 (2010-01-11 14:55:41)

Unue tiu ĉi tradukaĵo aperis en la rusa Esperanta revuo "La Nova Epoko" en Moskvo, en la jaro 1922.